




# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio"LANGUEDOC-ROUSSILLON"
Jarabono: 20 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon
CCP 936-28 P Montpellier


******

4a Kvaronjaro 1986 N° 99


## RENKONTIĜO : « FRATECO TRANS - PIRENEA »

★ COLLIOURE

JUVELO de la OR/ARGENTA MARBORDO



## FEDERACIA KONGRESO DE LANGVEDOKO - RUSILJONO.

## LA 9-AN KAJ LA 10-AN DE MAJO 1987

K O N G R E S E J O

Kultura Centro :Rue Jules Michelet
(apud la stacidomo)

Jen la titolo de la turisma broŝuro, kaj oni ne povus trovi pli taŭgan esprimon. Kiam, forlasinte la senfinajn sablojn de la strando en Argelès,oni grimpas la unuan krutaĵon survoje al Collioure, jam subite aperas de la supro la nekredebla bluo mediteranea kaj la unua vidado sur la roka marbordo,kie ŝaŭmas la ondoj.Kaj tiu nedifinebla kvalito de la lumo ! Tiu lumo,kiu ĉarmis,eĉ katenis famajn pentristojn kiel Matisse,Picasso,Derain,Dufy,Marquet... kaj nuntempe,dum la tuta jaro,ĉiam en la haveneto iuj artistoj starigas la stablon sur la eta kajo aŭ piede de l'impona murego de la Reĝa Kastelo.

Enfiksita en la roko inter la maro kaj montaro, la haveno Collioure jam en la sesa jarcento A.K. ludis por la Grekoj gravan rolon komercan : haltejo kaj kontoro sur la marvojo de la antika Agatho,nuna Agde, al vasta var-deponejo de Ampurias,en Hispanio. En la unua jarcento A.K. alvenis la Romianoj,kiuj instaliĝis kaj restadis dum 500 jaroj kaj disvolvis la urbeton. Poste alsturmis la Maŭroj, la Frankoj de Karolus Magnus,eĉ la Vikingoj,kiuj multe detruis ! Tial la sekvantaj mastroj, Rusiljonaj kaj Barcelonaj grafoj, pli kaj pli fortikigis la havenon. Dum la efemera Reĝlando de Majorko, de 1276 ĝis 1344, la Templanoj okupis la Reĝan Kastelon. Finfine la Historio decidis pri la sorto de Collioure : en 1659,per la pirenea traktato, la rusiljona provinco estis definitive aneksita al Francio.

Sed la tuta regiono ankoraŭ konservas siajn katalunajn radikojn kaj trajtojn,kaj, vizitante la malnovan vilaĝon,la kastelon kaj la ĉirkaŭantajn fortikaĵojn,oni ĉiu-paŝe retrovas spurojn de l'riĉa pasinteco de tiu loko, kiu denove estas invadita en nia epoko, sed nur de pacamaj turistoj kaj naturamantoj. Kaj en ĝi ni deziras al ĉiuj el vi feliĉan restadon kaj sunplenajn tagojn.

Elfrancigis C.BOUMAL.

★

*Collioure,dont il est question ci-dessus, sera le rendez-vous début Mai 87 des Espérantistes de la région, une rencontre fort intéressante puisque participeront aussi nos voisins et amis espagnols. Fin Mai, notre stage habituel aura lieu aussi près de la côte (Agde), le centre de Cassan étant indisponible (voir p.3)*
*Enfin c'est sur la Côte d'Azur que se déroulera début Juin le congrès national (P.11).*
*Le Congrès du Jubilé (fin Juillet à Varsovie) approche . Quelques courageux partiront à bicyclette de Perpignan en Février pour cette destination (P.5),d'autres prévoient le trajet en voiture ou en car (P.11). Mais nous n'oublions pas le récent congrès de Pékin auquel plusieurs personnes de notre région ont eu la chance de participer (P. 6 à 9)... Bonne lecture !*

# FEDERATION DU LANGUEDOC-ROUSSILLON POUR L'ESPERANTO
# ESPERANTO-FEDERACIO DE LANGVEDOKO-RUSILJONO

******

Président/Prezidanto:Jean Hénin
Beauregard.Route de Montcayroux
F. 48 500 La Canourgue
Tel 66-32-86-36

Secrétaire/Sekretario:Charles Gérard
4 Rue Docteur Georges Rives
F. 66 000 Perpignan
Tel 68-55-51-77

Trésorière/Kasistino:Lucette Négron
40 Chemin des Amandiers
F. 34 400 Lunel
Tel 67-71-05-79

Fédération d'E° du Languedoc-Roussillon
CCP 956-28 P Montpellier

Pri la problemoj de la federacio rilatu kun la du unuaj adresoj; pri abonoj al SFS aù adres-ŝanĝoj rilatu kun la kasistino, la abono restas 20 F, bonvolu ĝiri la sumon al la poŝtĉekkonto de la federacio aù sendu vian ĉekon al la kasistino. Indiku klare,ke temas pri abono al la bulteno. La federacio ne enkasigas monon pri kotizoj al UFE aù UEA,bonvolu en tiu kazo ekrilati kun UFE 4,bis Rue de la Cerisaie 75004 Paris CCP 855-35 D Paris Tel (I)42 78 68 86.

Anticipan dankon pro via reabono !

***

## KOTIZOJ

UFE: Simpla membro : 75 F Aktiva membro : 195 F (ricevas"Franca Esp-isto")
Aktiva membro /paro : 280 F

JEFO :Aktiva membro (ĝis 30 j.) : 75F (ricevas "Koncize"k."Jefo informas")
Aktiva membro Jefo-Ufe : 195 F

UEA: MJ : Membro kun Jarlibro 80 F MA :Membro kun Jarlibro kaj "Esperanto" : 200 F
MG : Membro kun gvidlibro 32 F DM :Dumviva membro 5000 F

TEJO: (ĝis 25 j.) MJK : Membro kun Jarlibro kaj "Kontakto" : 80 F
MAK : " " " kaj "Esperanto" : 200 F

La membroj kiuj kotizas al Jefo aù Tejo ricevas senpage la libreton "Pasporta Servo".

***

## ABONOJ

Ne-kompleta listo !

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Esperanto-Vaucluse | 12 F | Laùte | 30 F | La Migranto | 30 F |
| Transalpa Esp-isto | 35 F | Icem-E° | 50 F | Kulturaj Kajeroj | 60 F |
| El Popola Cinio | 90 F | El Popola Cinio (tri jaroj) : 210 F | | | |
| Heroldo | 110 F | Sat-Amikaro | 125 F | Literatura Foiro | 145 F |
| Monato | 175 F | La Jaro (Monato) | 22 F | | |

****************************************

*Tiu-ĉi numero de "Sudfrancia Stelo" ne estas kiel kutime. Pluraj federacianinoj raportis pri siaj vizitoj al Ĉinio kaj la Pekina Kongreso, tio klarigas,kial pluraj regulaj rubrikoj malaperis -tute provizore! SFS estas nur dekdupaĝa,do estas necese elekti. Restas do en la rezervo por alifoja aperigo diversaj artikoloj kaj kontribuoj: la krucvortoj kaj ludoj, la "Letero el Nimo", la paĝo "pri la angla lingvo", la "gramatika paĝo", konsiloj pri ekspozicioj kaj forumoj,ktp. Ni kalkulas je via komprenemo! La venonta numero estos la centa.....ĝuste en la centa jaro de Esperanto ! Anticipan dankon pro via kunlaboro !*

*J. Hénin.*

****************************************

★

DUA PEDAGOGIA SEMINARIO de UFE-GEE: de la 17a ĝis 20a de Aprilo 87
en CISL 46,Rue Commandant Pegoud 69008 LYON

***

Temo: Instruado de E° al infanoj de elementa lernejo, al mezlernejanoj, liceanoj kaj studentoj.Prezento de la eksperimento de Villefranche
Ĉiu partopreninto ricevos ateston pro partopreno.

Aliĝo:Aliĝo al la seminario = 200 F/Tranokto + 3 manĝoj po persono k.tago=220 F
aù: ĉiu manĝo :70F tranokto + matenmanĝo 80 F

Detaloj : haveblaj de CERL 7,Rue du Major Martin 69001 Lyon aù petu de J. Hénin.

# LINGVO-STAĜO ⟶ EN AGDE de la 27a ĝis la 31a de Majo 1987

Pro neatendita fermo de la Kastelo Cassan, ni devis serĉi alian staĝejon. Fine ni trovis taùgan kaj komfortan domon en Agde : Centre Batipaume, Route de Rochelongue. Bedaùrinde la prezo estas iom pli alta. Por la 4 tagoj, la elspezo estos 500F (kompleta pensiono). Oni povas kunporti siajn littukojn aù ilin lui surloke (25F). Kunportu tualet- kaj manĝo-tukojn. Dulitaj ĉambroj, kelkaj unulitaj (se vi deziras tian ĉambron, aliĝu kiel plej rapide), kelkaj sur la teretaĝo. La aliĝkotizo estas 20F ĝis la 31a de Marto, 40F poste. Junuloj malpli ol 25 jaraj ne pagas la aliĝkotizon.
Antaùpago por la restado : 50 F
La laboro komenciĝos jam ekde la 28a matene, do oni devas alveni la 27an posttagmeze. Se vi alvenos trajne, indiku la horon, oni atendos vin ĉe la stacidomo. Ni alvokas la kapablulojn por gvidi kurson aù kontribui al la distraj vesperoj.
Informoj kaj aliĝo : Cercle Biterrois d'Esperanto 9, Rue G.Picot 34500 Béziers
Tel. 67-31-13-18 aù 67-31-13-46 aù 67-38-03-52, prefere ĉe la manĝohoroj.
Ni kalkulas pri via partopreno kaj tiu de viaj gelernantoj.
Aliĝu kiel eble plej frue. Antaùdankon !

******

Le stage habituel aura lieu du 27 au 31 Mai 1987 après-midi.
En raison de la fermeture inattendue du Château de Cassan, nous avons dû chercher un autre lieu de stage. Finalement nous avons trouvé un local confortable et adapté à nos besoins à Agde : Centre Batipaume, Route de Rochelongue. Malheureusement, le prix est un peu plus élevé. Pour les 4 jours, la dépense sera de 500 F (pension complète). On peut apporter ses draps ou les louer sur place (25 F). Apportez linge de table et de toilette. Chambres à 2 lits, quelques unes à 1 lit (si vous en désirez une, adhérez le plus vite possible), qualques unes au rez de chaussée. La cotisation d'adhésion est de 20F jusqu'au 31 Mars, 40 F ensuite . Les jeunes de moins de 25 ans ne la paient pas.
Arrhes pour le séjour : 50 F
Le travail commencera dès le 28 au matin, donc vous devez arriver le 27 après-midi.
Si vous arrivez par le train, indiquez l'heure, on vous attendra à la gare.
Informations et adhésions : Cercle Biterrois d'Esperanto, 9, Rue G.Picot 34500 Béziers
Tel. 67-31-13-18 ou 67-31-13-46 ou 67-38-03-52, de préférence aux heures des repas.
Nous comptons sur votre participation et sur celle de vos élèves.
Inscrivez-vous le plus vite possible. Remerciements anticipés.

---

## ALIĜILO --- BULLETIN D'ADHESION

Nomo kaj persona nomo (Nom et prénom)...........................................

Adreso (Adresse)..................................................................

................................ Tel : .................

Mi alvenos per privata aùtomobilo, trajno je la ......h....
(j'arriverai en voiture particulière, par train) (à)

Kurso kaj nivelo (cours et niveau)..................ou: je suis débutant complet.

Ekzameno: mi deziras trapasi la unuan, duan, trian ekzamenon (forstreku se necese)
Ni organizos ekzamenojn, se vi sufiĉe frue konigos al ni vian deziron.

(je désire passer le premier, deuxième, troisième examen)

Aliaj deziroj aù informoj : (persona ĉambro)....................................
(autres souhaits ou renseignements : chambre à un lit, etc)

..........................................

Mi pagas 70 F (20F aliĝo +50F antaùpago) al: Cercle Biterrois d'Esperanto
(je paie 70F : adhésion 20F + arrhes 50F à) 9, Rue G. Picot 34500 Béziers

Mi aldonas afrankitan koverton kun mia adreso
(je joins une enveloppe timbrée à mon adresse)

# VIVO DE LA GRUPOJ

*Malmultaj grupoj raportis (nur unu!). Kiel la grupoj pretiĝas por la Jubilea Jaro restas mistero. Ĉiufoje la limdato por sendo de artikoloj aperas sur la lasta paĝo de SFS. Anticipan dankon por la venonta numero, la centa !*

---

**CERCLE BITERROIS D'ESPERANTO**
9, Rue Georges-Picot - 34500 BÉZIERS
CCP Montpellier 1 606 29 T

La kursoj okazas:
ĉiun ĵaŭdon je 17 h. 9, Rue Georges Picot
ĉiun vendredon, je 14h30 en la Klubejo Caserne St Jacques

********

La ĝenerala kunveno okazis la 8an de Novembro. La agad- kaj financ-raportoj estis unuvoĉe akceptitaj, la komitato restas la sama.
Daŭre la kunvenoj okazos la unuan sabaton de ĉiu monato (principe).
La grupo festis la Zamenhofan Tagon la 7an de Decembro. Post la komuna tagmanĝo, oni montris filmon pri Cinio.
Dum la unua kunveno de Januaro (10/1) la tagordo entenos detalojn pri la organizo de la staĝo de Agde. La kasisto rememorigas al tiuj, kiuj ne pagis la kotizon, ke ili povas ĝin sendi al la poŝtĉekkonto 1 609 29 T Montpellier (40F aŭ 60 F por paro).

---

*Apartan dankon al S-ino Authier, kiu devis klopodi por trovi alian centron por la staĝo!*

---

*Perpignan : La grupo zorgas pri la venonta kongreso en Collioure kaj kontaktis niajn Hispanajn gesamideanojn okaze de la Kongreso de Lleida.*
*La programo por tiuj du tagoj estas preskaŭ preta. Vi trovos ĝin en la venonta numero de SFS samtempe kun aliĝilo... ĉar la Perpinjananoj atendas vin multnombre en Collioure en Majo 87.*

Gratulojn al la du grupoj de Perpignan, kiuj sendis la reabonojn al SFS jam en Novembro... Imitinda ekzemplo. Grupoj, sendu la abonojn/reabonojn antaŭ la fino de Marto 87, tio multe faciligos "glatan" servon de la bulteno. Anticipan dankon !

*****

Dank'al C. Boumal la regiona prospekto (por ekspozicioj, forumoj...) estas preskaŭ preta. Lastfoje ni petis ĉiun grupon elekti 1,2 aŭ 3 telefon-numerojn por mencio sur la lasta paĝo de tiu prospekto. Mankas respondoj de Alès, Montpellier, Nîmes.

*****

*Nîmes: Laŭ "Esperanto Vaucluse", post la tria Rodana E°-rendevuo, ok amikoj el Italio kaj Bulgario vizitis la Urbon kaj la faman "Pont du Gard"*

****************************************************************************

# ĉe niaj najbaroj

AVIGNON : La 3a Rodana E° Rendevuo arigis sesdekon da personoj. La 14an de Decembro, okaze de la Zamenhofa Tago, D-ro Albault prelegis pri :"Zamenhof, la unua Esperantisto"; S-ino Humm montris bildojn pri "Lavendo en Provenco".
La 42a kongreso de SAT-Amikaro okazos en Vaison-la-Romaine de la 18a ĝis la 21a de Aprilo 1987.




TOULOUSE : Kurso ĉiulunde ĉe "Espace Bonnefoy" (19h ĝis 21h)
adreso: 31, Rue Périole -sur la unua etaĝo
Esperanto per kanto : ĉiuvendrede (19h15 ĝis 21h15)
Por korespondi kun la Tuluza grupo: 21, Rue de Verfeil 31200

SABADELL (Katalunio)
ĵus aperis kolora turisma faldfolio pri Sabadell. Por danki la Urbestraron, kiu eldonis la prospekton kaj ricevi tiun prospekton senpage, sin turni al:
Ajuntament de Sabadell Plaça de Sant Roc 08201 Sabadell

****************************************************************************

# FUNEBRO

Nia amiko André Capus perdis sian patrinon fine de Septembro.
Al lia familio nian sinceran kondolencon.
Antaŭ unu jaro SFS prezentis IEKA (Internacia E°-klubo aŭtomobilista). Post J. Guillaume respondecis pri ĝi R. Bastong, kiun pluraj el ni renkontis en Aŭgsburg.
Li estis grave vundita en Parizo, meze de septembro 86 de bombo ĵetita de teroristo. en Rue de Rennes kaj forpasis meze de Novembro, post longa senkonscio. Grava perdo por E°.

********

## Niaj legantoj skribas



*Nia juna samideano Alexandre Rousset, 4,Rue Monnaie,30400 Villeneuve lès Avignon proponas ŝanĝojn en la E° movado kaj sendis longan leteron. Jen la unua parto de lia argumentaro,kiu certe estigos debaton inter la legantoj.*

Cele al pli racia vido de la fenomeno E°: unue,kelkaj terminaj modifoj.

Jam staĝinte 3 monatojn por UEA kaj studinte la ekonomiajn specifaĵojn de E° lume de mia sperto de HEC-diplomito,mi pensis utila por la postnuno de E° en Francio la konigon de mia tiutema analizo,ne por ŝoki la tradiciismanojn sed por konsciigi la raciulojn pri la eblo raciigi ankaŭ la E°-varbon.

Unue,mi esprimas iom da indigno pri la postvivo de la malverigita nomaĵo "La lingvo inter--nacia" pri E° : ĉiu scias,ke la vera L.I. estas ja la angla,nuntempe.Tial,E° ridindigas sin pro troa ambicio; por interesi sian eblan publikon, tiu devus pli inteligente nomi sin "La internacia helpa lingvo" (la langue auxiliaire internationale).Tiel,ĝi estigus intereson pli ol ridon,unuavide...eĉ se ĝi perdus iom de sia orgojlo.E° estus do pli servema ol serviĝema, male de sia ofte sentata konkeremo. Efektive,ĉu ĉiu el vi ne aŭdis almenaŭ unufoje aludon pri la kredo,ke E° celas forigi la riĉan multecon de niaj naturaj lingvoj profite al nehoma pseŭdolingvo ? Nepra antaŭkondiĉo por disŝatigi E-on estas sendube plibonigi ties bildon (nun relative aĉan!):tiu transnomigo certe kontribuos en tio. Samdirekte, evidentas,ke la primitiva kredo "komuna lingvo kapablas plibonigi la homaron per pli da interkompreno" tute malveras : sufiĉas rigardi la nunan staton de la unulingva Libano por agnoski tiun bazan ideon. Tial,la tiel nomata "interna ideo" forpuŝendas (male de kio aperas en la freŝa "E° actualités" tute pri "la paco") se ni ne plu volas aspekti sekto (kun ties kulto al Zamenhof,la 14an de Decembro,kaj la "homaranismo" ĉie en ties idealo...). Se okazontas transmensiĝo en la homo pro E°,tio fariĝos sen nia interveno: ni ne bezonas do emfazi sektecan argumenton kiel la pacamon de la E° movado !

Alia sekteca malhelpaĵo estas cetere la uzo de la vortoj "esperantismo,esperantistoj",kva--zaŭ temus pri religia aŭ politika afero. Kial ne (pli realisme) ni diru "e-aneco,e-anoj" (espérantophonie,espérantophones) por limigi nin en la lingva kampo? Aliaj konsiloj miaj sekvos : retroagu do por estigi veran debaton.

A.Rousset

******

## BICIKLE TRA EUROPO

Internacia Esperanto-propaganda biciklado

Jen la propono de JORGOS -12 Place Picasso
66400 CERET

Foriro en Februaro 87 el Perpinjano...al Varsovio.

Vojirado: en Februaro tra Hispanio kaj Portugalio.(1500/3500 km)
en Aprilo : en Francio,ĉefe ĉe Sudfrancio (1000/4000 km) kaj poste,se eblas, ĉe iomaj partoj de Itala kaj Svisa landoj,norden ĝis (kial ne?)Danlando...
por atingi la Jubilean Universalan Kongreson en Varsovio fine de Julio.

Ankaŭ BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) proponos Parizo-Krakovan bicikla--don ekde la 25a de Junio. Ni provos kunpedalumi.

La grupo petas sin anonci kaj bonvenigas ĉiun kunpedalumontan homon (ĉu Esperantisto,ĉu Ne-esperantisto,ĉar kompreneble Esperantokursoj okazos laŭ la vojrajdado.Diru al ni en kiu urbo vi loĝas kaj dum kiom da tagoj vi biciklos.

Ni ankaŭ alvokas la Esperantistojn kaj petas ilin anonci plej frue kiel eble:

-la organizotajn esperanto-aranĝojn,renkontojn,kongresojn,ktp...kiujn la biciklontoj povus partopreni,

-la organizotajn neesperantajn sed tamen internaciajn renkontojn kie E° rajtos esti disko--nigata (revidi la Unesko-alvokon al neregistaraj organizoj internaciaj,pri centjariĝo de E°,por disvastigi ĝian uzadon)

-kiuj E°-grupoj pretas aranĝi renkontiĝon ĉefe per antaŭaj anoncoj de lokaj ĵurnalistoj por publika diskonigo de la grava evento "Centjariĝo de Esperanto",kaj de la tiutempa trabiciklado de la regiono fare de diverslandanoj esperantistaj kaj neesperantistaj,kiuj deziras pli facilajn eksciiĝon kaj lerneblecon de Esperanto.

Post ricevo de viaj informoj, ni precizigos kiun tagon ni pretos halti en kiuj urboj aŭ vilaĝoj,laŭ la organizeblaj konferencoj aŭ spektakloj. *ĈIO ESTAS EBLA!*

La Esperanta lingvo bone funkcias kiel internacia komunikilo; ni pretas tion elpruvi.

NESCII NE ESTAS MALBONE - (EK)SCII ESTAS BONE - SCIIGI ESTAS BONEGE.

Jorgos

★

# IMPRESOJ PRI ĈINIO



*Niaj Samideaninoj Suzanne Authier (Béziers) kaj Marcelle Maurin havis la ŝancon partopreni la Pekinan kongreson; ili konsentis raporti por SFS:*

Kiam fine de iom longa vojaĝo,mi malfermis la okulojn,la aviadilo jam superflugis la montojn de Ĉinio. Kun scivolemo,sed duondormante,mi rigardis tiujn montojn ne kovri-tajn de arboj,ŝajne malfekundajn. Sed,baldaŭ,sur la akraj eĝoj,mi ekvidis ion longan, dubeblankan. Ho,jes! jen la Granda Muro ! Mi tuj komplete rekonsciiĝis kaj miaj okuloj ne povis sin deturni de la spektaklo. Ĉar, iom post iom la aparato malaltiĝis,mi povis pli kaj pli bone vidi detalojn. La serpentuma muro adaptiĝas je ĉiuj konturoj de la montoj : ĝi aspektas kiel remparo krenela, kaj regule gvatturoj staras precipe sur la montopintoj. En la matena sunlumo la ŝtonoj diverse koloriĝis laŭ la kapricoj de la nuboj kaj suno rozkolore,flave,dubeblue. Certe,poste,ekskurso celis la Muron,sed mi tute ne havis la saman impreson kiel en tiu mateno. De la ĉielo oni povas vidi kilo-metrojn kaj kilometrojn de la konstruaĵo serpentumanta kiel drako ŝajne senfine. Kiam oni promenas sur ĝi,oni ne tiel konscias pri la dimensioj. Kaj, ve ! estas tiom da homoj,ke oni sin kredus sur bulvardo de granda urbo. Plie,la marŝado estas peniga pro la deklivoj,kaj,baldaŭ mi devis rezigni la promenon kvankam neniu intencis trairi 6000 kilometrojn! Cetere tio tute neeblas ĉar en pluraj partoj la Muro estas difektita kaj danĝera.

Post la surteriĝo,sen ripozo en hotelo,ni devis komenci la viziton de Pekino. Tiun matenon,la plej miriga loko estis la treege granda ĉefplaco de Tian'anmen,kies areo estas 40 hektaroj. Meze de ĝi staras la Monumento al la Popolaj Herooj (38 m alta), ĉirkaŭe la Imperiestra Palaco kaj la Maŭzoleo de Mao. Kompreneble,mi ne intencas priskribi ĉiujn monumentojn,templojn,kiujn ni vidis. Vi trovos ĉiujn detalojn en diver-saj gvidlibroj (france kaj esperante ĉe la libroservo). Mi parolis pri Tian'anmen nur ĉar ĝi estas la koro de Pekino kaj vere mirigas nin pro siaj dimensioj.Cetere, preskaŭ ĉio estas supermezura en Ĉinio. Imagu, ke dum la kongreso nia hotelo kuŝis je 20 km de la kongresejo,sur la "Parfumitaj montetoj". Ĉarma nomo,sed kiom da horoj perditaj en la aŭtobuso!

Niaj ĉinaj amikoj ne havas multe da spertoj pri la organizo de kongreso. En la unua tago, ĉiuj kongresanoj kuris tien kaj tien por trovi la akceptejon ! Finfine "iu" trovis ĝin...en la kelo,en anguleto,kaj vi povas imagi la malfacilaĵojn por ricevi la doku-mentojn. La libroservo troviĝis sur la kvara etaĝo. La rendevutabulon ni vidis nur la trian tagon...en la kelo. Se ni esceptas tiujn mispaŝojn,tamen amuzajn, la kongreso bone disvolviĝis en taŭgaj salonoj kaj la vesperoj okazis en granda teatro. Ni povis ĝui dancojn, akrobataĵojn, muzikon,kantojn. Kiel en ĉiuj kongresoj ariĝis homoj de multaj landoj (54) sed por la unua fojo ni havis la eblecon kaj la ĝojon renkonti Ĉinojn, kaj paroli kun ili sen malfacilaĵo.

En Pekino, kiel en aliaj urboj, la stratoj estas plenplenaj de bicikloj,preskaŭ ĉiuj nigraj, sen rapidumŝanĝilo kaj kun numeroj de registrado. Tre ofte aranĝitaj por transporti pakaĵojn,korbojn kun kokinoj aŭ anasoj. La Ĉinoj havas neniun alian indivi-duan rimedon por tio. Tamen tiu biciklo estas tre multekosta : ĝi postulas la salajron de ĉirkaŭ tri monatoj (informo donita de nia ĉina oficiala gvidisto). Krom la bicikloj oni vidas nur ŝtatajn taksiojn kaj kamionojn ankaŭ ŝtatajn.La komunaj aŭtobusoj estas ĉiam plenŝtopitaj. La prezo por la vojaĝo feliĉe estas tute malalta (20-30 francaj centimoj). Sur la stratoj la homoj svarmas,sed neniam ni vidas katojn aŭ hundojn. Pluraj turistoj tion rimarkis kaj la respondo estis :"Hundoj estas tute malpermesitaj (eĉ en la domoj) Oni konsentas pri katoj,kondiĉe,ke ili restas"hejme. Tamen ni vidis kelkajn hundojn en la kamparaj farmoj -tie ili estas utilaj kaj gardhundoj.



La kamparanoj rajtas havi dombestojn kaj rikolti legomojn, fruktojn. Do rande de la stratoj aŭ vojoj,ni renkontis la t.n. "liberajn bazarojn". Tie ni povis aĉeti persikojn,ne ruĝajn sed maturajn kaj bongustajn,pomojn iom acidajn, eĉ vinberojn kaj precipe akvomelonojn(multe,multe) kies ruĝa,akva pulpo ebligis kvietigi soifon,ĉar la vetero somere estas varmega.


Ni ne vidis variajn legomojn. Altiris nian intereson la verdaj fazeoloj almenaù 50 cm longaj kaj flekseblaj kiel folioj de poreoj. Ni vidis ankaù verdajn foliojn, kies nomon neniu el ni konis,sed kiujn kelkfoje ni manĝis en restoracioj.La legomoj estas apenaù kuiritaj kaj ofte ni trovis ilin tro malmolaj. Ĝenerale la uzo de basto--netoj ne estas malfacila sed,kiam la saùco glitigas la pecojn povas ekesti problemoj. Cetere pri la manĝoj ni havis multajn surprizojn. Preskaù ĉiam ni nesciis,kion ni manĝas. Iun tagon,unu el ni diris :"ĉu temas pri angilo aù melongeno?".Alian fojon,ĉe nia tablo "io" dubeblanka kaj iom glita en ruĝa saùco ŝajnis al ĉiuj esti fungoj ĝis kiam iu gasto triumfe eltiris el sia buŝo fiŝoston!! Sed ne kredu,ke tio estis malbona,kaj se vi ne aprecas ion,sur la tablo estas ĉirkaù 10 malsimilaj manĝaĵoj kaj vi povas elekti : sufiĉas turni la grandan "subpladon" sur kiu estas amasigitaj pladoj meze de la tablo. Tiu aparato (kiu nomo?) facile turniĝas sur globlagro,sed atentu,ke neniu telero aù bastoneto elstaru ekster la rado ĉar tiam la glasoj aù boteletoj sur la tablo fariĝas kegloj.

Post la kongreso,ni vizitis plurajn urbojn kaj famajn lokojn.Inter ili tre plaĉis al mi la ŝtonarbaro apud Kunming. Grandegaj ŝtonoj staras meze de arbaro.Ili similas diversajn objektojn aù bestojn. Iliaj nomoj estas elvokivaj : najtingalo kantas,hirundo dancas,bona ĉevalo de la suda ĉielo,ktp. Kvankam interesa, precipe pro la griza koloro de la ŝtonoj, tio ne estas raraĵo. En nia regiono ni havas Mourèze kaj Montpellier-le--Vieux, sed en ĉi-tiuj lokoj la ĉirkaùa naturo ne estas tiel verda,kiel en Lunan.

Alia belega travivaĵo estis krozado sur la rivero Lijiang. Dum 8 horoj ni promenis sur rivero borderita de montoj kaj kelkaj vilaĝoj. La pejzaĝo similas veturadon sur tradicia ĉinstila pentraĵo. La montoj elstaras tre vertikale kaj havas pintan supron iom rondforma,sukerkonuse. Sur la akvo flosas bambuaj boatetoj de fiŝistoj per kormorano, aù rikoltistoj de algoj uzataj por la nutrado de la brutaro,precipe bubaloj.La vojaĝo estis tre ripoziga post tiom da paŝoj en la antaùaj tagoj dum vizitoj de urboj kaj monumentoj kun multaj ŝtuparoj.

En tri urboj,esperantistaj grupoj akceptis nian karavanon. La renkontiĝoj okazis en varma etoso kaj por multaj el niaj invitantoj estis la unua kaj la nura okazo paroli kun eksterlandanoj : granda ĝojo por ili,kiuj klopodis por lerni esperanton.Mi povas diri,ke ĉiam kaj ĉie ni renkontis ĝentilajn kaj afablajn homojn,eĉ kiam ni ne povis uzi la internacian lingvon. Do restas al ni bona memoraĵo pri nia restado kaj bedaùras,ke tiun landon tro malproksiman ni ne povas viziti pli ofte.

Suzanne Authier



## IOM PRI ĈINIO KAJ LA UNIVERSALA KONGRESO :

Pekino! En la plej aùdacaj sonĝoj de mia junaĝo mi neniam esperis koni iun tagon tiujn por mi fabelajn urbon kaj landon.Kaj tie, per komuna lingvo kontakti la popolon,estis ankoraù multe pli alloga ! Do kun granda entuziasmo mi foriris al la UEA kongreso.

Sed la renkonto kun la grupo en Parizo iom elrevigis min ĉar mi vane serĉis esperantan stelon aù flagon, kaj aùdis preskaù nur la francan lingvon kvankam ĉeestis kun ni du eksterlandaninoj.

Alvenante de Parizo 10 tagojn antaù la kongreso ni ne renkontis esperantistojn sed vizitis dum 2 tagoj la urbon,laù la programo de nia vojaĝagentejo Transtours,antaù ol ekflugi al Kunming en la Junan provinco. Tie, tuj elirante el la aviadilo,ni vidis grandan verdan stelon kun la vortoj :"Bonvenon al ĉiuj eksterlandaj gesamideanoj!". Estis iu tre fervora esperantisto,kiu venis el 300 kilometroj por renkonti nin,la plej kortuŝa renkonto de nia tuta vojaĝo. La morgaùon,kun 2 aliaj kamaradoj,li iris aùtobuse al la "ŝtona arbaro" je 135 km por denove renkonti nin promenantaj inter la rokegoj. Bedaùrinde ni povis nur mallonge en la hotelo babili kun la malgranda grupo.

Post vizito pli norde deĈongĉing,Dazu,Ĉengdu ni denove trafis Pekinon,kie atendis nin granda elreviĝo : ni ne plu povis loĝi en la "Hotelo de la Amikeco",kiel la unuan fojon,ĉar tie,tute proksime de la Kongresejo,loĝis nur,laù mia scio,la UEA-anoj,kiuj venis pere de la Asocio el Roterdamo. Granda problemo por trovi la necesajn aùtobusojn je la necesaj horoj por iri pere de ili,dum 30 minutoj,ĝis la kongresejo.Do,la unuajn

du tagojn regis fuŝo,misinformoj,longaj atendoj,eraroj. Tamen ĉio poste sufiĉe kon-tentige solviĝis kaj ni estis tre kontentaj de nia luksa hotelo.

Ĉar mi, sincere dirite,aliĝis al la Kongreso por viziti Ĉinion kaj interrilati kun Ĉinoj pli ol partopreni la aranĝojn de la Kongreso,mi pacience povis atendi por ricevi la dokumentojn,je sabato matene,post trovo de la salono,kie oni disdonas ilin.

Malfacile estas organizi kongreson de pli ol 2000 personoj por ke ĉio iru glate! La kongresejo estis tre granda,kun 4 etaĝoj kaj unu subtera,multaj salonoj kaj granda amfiteatro sufiĉe granda por enteni kongresanojn kaj invititojn. En tiu "labirinto" mi komence preskaŭ perdiĝis,kio ne helpis la aferon...

La dimanĉon matene mi partoprenis la solenan inaŭguron en la Ĉina Teatrejo,kie paroladis,krom la UEA kaj ĉinaj estraranoj la ambasadoroj de diversaj landoj,sed mi ne povis resti ĝis la fino pro foriro de mia aŭtobuso; se mi maltrafus ĝin,mi ne plu povus retrovi mian hotelon...

La kongreso organizis ekskursojn por ĉiuj,ĉu matene,ĉu posttagmeze kaj mi enskribiĝis por la posttagmezaj (ni pagis en Francio por tiuj ekskursoj,kiuj inkluzivis iun manĝon). Do,nur ĝis tagmezo mi ĉeestis en la kongresejo kaj povis partopreni nur malmultajn kunvenojn. La problemo pri "Internacieco de Esperanto el neeŭropa vidpunkto" interesis min sed ne permesis aŭskulti samtempe la prelegon pri la vivo de Lidia Zamenhof. La kongresajn temojn pri internacia interkomprenigo kaj paco mi ĉiam laŭeble partoprenis kaj ŝatis,speciale paroladon de japana kuracisto pri la politika situacio en Japanio rilate la pacon.

Merkredon,ĉiuj kongresantoj per kvindeko da aŭtobusoj vizitis sub bela suno la faman "Grandan Muron",unu el la mirindaĵoj de la mondo. Preskaŭ ĉiuvespeere ni povis ĝui belegan spektaklon kun riĉaj kostumoj,buntaj koloroj : dancojn,kantojn,muzikon,folkloron, akrobataĵojn,eĉ operon,ĉiuj vere admirindaj. La kongresa fermo okazis denove en la Ĉina Teatrejo,iom emocia kun la transdono de la flago al la Varsovianoj por venontjaro.

Kaj la dimanĉon ni denove forlasis Pekinon por Xian,Ŝanghaio,Guiling,Kantono,kaj fine Hongkongo. En ĉiuj urboj ni vizitis mirindaĵojn kiel la "argila armeo" de la imperiestro Qin,proksime de Xian kaj la "valo de la trezoroj" en la regiono de Dazu,kaj ĝuis belegajn strangajn pejzaĝojn kiel ĉe Guiling kaj la rivero Li.

En Xian kaj Ŝanghaio ni havis programitan renkonton kun la tieaj esperantistaj grupoj- inter 1000 kaj 2000 en Ŝanghaio sed,krom la paroladoj de la organizantoj kaj interŝanĝoj de informoj kun ili,mi havis personajn kontaktojn nur kun komencantoj,ĉar oni demandis al ni,ke ni paroligu ilin kaj la konversacio ne estis tre riĉa,bedaŭrinde.Pluraj komencis lerni nur lastjare kaj por ili,kompreneble,Esperanto estas multe pli malfacila ol por ni. Sed ĉiuj deziregas lerni por renkonti denove eksterlandanojn kaj diskuti kun ili. En Congĉing,pro kulpo de Transtours,kiu ŝanĝis nian programon,la renkonto kun la esperan-ta grupo ne povis okazi,vere domaĝe !

Kion konkludi pri tiu nekutima vojaĝo ? Kvankam ni ne havis okazon eniri ĉinan hejmon, ni tamen iom konatiĝis kun la lando kaj la vivo de la popolo en la diversaj trairitaj regionoj,kun iliaj vivrimedoj,agrokulturo kaj industrioj.Kaj tiu preskaŭ-monato restos granda okazintaĵo en mia vivo.

Rilate la kongreson,la lokaj organizantoj certe faris ĉion eblan,kvankam etaj detaloj mankis por glatigi ĉion : ekzemple nur granda plano en la kongresa halo de la enirejo kun la nomoj de ĉiuj salonoj estus faciligintaj la bonordon dum la unuaj tagoj. Sed verŝajne en Pekino kaj por 2000 personoj ne eblis loĝigi ĉiujn en la proksimeco de la kongresejo,ne eblis permesi,ke la kongresantoj intermiksiĝu en la aŭtobusoj,en la hoteloj kaj restoracioj en kiuj la ĉinoj ne rajtis eniri,pro tio bedaŭrinde ni ne povis havi kun ili la deziritajn kontaktojn. Sed mi opinias,ke la diversaj esperantistaj grupoj,kiuj vizitis Ĉinion devus havi sur la aŭtobusoj esperantajn stelojn,flagojn, por reklami por nia lingvo kaj instigi la ĉinajn esperanto-komencantojn al la kompleta lernado. Ĉar mi restas konvinkita,ke multaj tion deziregas,ĉar ili ne havas alian eblecon por konatiĝi kun homoj el ĉiuj landoj.

Marcelle Maurin.

# Pekino

# La plej granda U.K. ekster Eŭropo 2482 kongresanoj el 54 landoj

# IOM PLI PRI LA U.K.


Atingis nin du aliaj kontribuoj pri la Pekina kongreso,la unua de Alice Payret (Perpignan), kiu iris al la kongreso ...per trajno.
La alia kontribuo estas plej interesa ĉar temas pri la unua UK de Marie Candel (Nîmes), Kun du geamikoj,ŝi vizitis parton de Ĉinio dum du semajnoj antaù la Kongreso.Tiun-ĉi fojon ni aperigas nur ŝiajn rimarkojn pri la UK,venontfoje ni vizitos Ĉinion kun ŝi...

******

*Kiam finiĝis nia longa vojaĝado tra la Azia kontinento per la famaj trajnoj "Transsiberia" kaj "Transmongolia",ni tre ĝoje alvenis en Pekino,tiel granda urbo,kun tiom da loĝantoj, multaj biciklante kaj ĉirkaùante la aùtobusojn; mi estis ege surpriz ita dum la unua trairado ĝis la bela hotelo "Fragrant Hills" ekster Pekino,je ...tridek kilometroj. Pro tio estis malfacile por ni partopreni la diversajn aranĝojn en la Kongresejo. Ni bedaùris tion,ĉar pro tio ni malofte interparolis kun alilandaj esperantistoj. Eĉ dum la ekskursoj ni estis ĉiam inter ni. Tamen mi ŝatis la diversajn vesperojn, la malfermon kaj la fermon,kiuj permesis kelkajn kontaktojn kun la ĉina esperantistaro. De nia tuta restado en Pekino ni konservas neforgeseblan memoron.*

*Alice Payret.*

******



NIA UNUA UNIVERSALA KONGRESO:

La amasloĝejo estis malproksime de la Kongreso.Kiam ni alvenis,ni devis atendi kaj klarigi tion,kion ni volis. Post trihora traktado ni akiris la ŝlosilon de nia "dormo--ĉambro";Ĉinaj esperantistaj helpantoj zorgis pri ni.
Kiam ni eltrovis nian loĝejon,ni estis seniluziigataj.Ni sciis,ke estis dormejoj kun kvar litoj sed ni ne imagis tion...
La litoj estis lignotabuloj kun mato kaj la kovrilo estis granda sponga tuko,la sama kiel en ĉina hotelo.Necesejoj estis ĉinaj necesejoj sed certe estas preferinde ne priskribi ilin kaj eviti elvoki la odorojn.La lavaboj estis komunaj en gran--da ĉambro ofte inundata kaj sen varma akvo.Ni prenis neniun duŝon dum nia restado en la amasloĝejo.Ni estas junaj kaj kontentiĝis pri tiu situacio sed ni estis vere malfeliĉaj pri la pli aĝaj esperantistoj. Ni rimarkis,ke la ĉinaj esperantistoj estis aparte de la aliaj esperantistoj./........../Ni estis seniluziigataj,ĉefe ĉar ni vizitis Ĉinion antaù la Kongreso kaj ni konis la prezojn de la loĝejoj kaj de la manĝaĵoj.Ni vere pagis tro multekoste nian dormoĉambron en la amasloĝejo. Per la duono de la prezo,ni povintus havi duoblan dormoĉambron,klimatizitan,kun okcidentaj litoj,bela necesejo kaj banĉambro, televidilo,ktp.
Alia ekzemplo pri la malsamo de la prezoj : la ekskursoj proponitaj en la programo. Duontaga ekskurso por viziti la "Malpermesitan Urbon" kun ir-kaj reven-veturado per taksio, la vizito kaj manĝo,kostis al ni proksimume 25 Yuan. La programo de la kongreso proponis la samon po 50 Yuan/....
.../ Ni ĉeestis du prelegojn. La unua (Filozofio pri Edukado) estis interesa sed unu el la prelegantoj malbone parolis;tio ĝenis nin kaj malgrandigis nian intereson.
La dua (Interkompreniĝo,Paco,Evoluo) male estis bone animata de Svisa esperantisto.Ni ekkonsciis,ke ni bone komprenis la paroladon malgraù nia ne tre alta nivelo en E°.
La personoj en la amfiteatro partoprenis en la diskuto kaj estis eble por ili iri al la tribuno kaj esprimi sin .
*(Niaj geamikoj decidis loĝi en unu el la hoteloj de la kongreso dum la lastaj tagoj por profiti de komforto antaù la foriro,malgraù la altaj kostoj)*

******

...Fine,la duan de Aùgusto okazis la Fermo de la 71a U.K. de E° en Pekino. Ni iris tien per taksio,ĉar la Fermo estis en malproksima loko,en ĉina teatro.
Estis multaj,multaj personoj kaj estis vere tre interese kaj imprese. Oni kune kantis la esperantistan himnon. La organizantoj estis gratulataj kaj ili ricevis medalojn aù belajn florbukedojn. Tiu tre bona impreso,malfeliĉe, estis stompata je la fino de la Fermo de la Kongreso ĉar ni renkontis problemojn de transporto por la reveno.
La transporto per busoj estis antaùkalkulita nur por pli riĉaj esperantistoj,kiuj povis pagi por supraj kategorioj. Kelkaj busoj,kun liberaj sidlokoj,foriris rifuzante esperantistojn ,kiuj ne estis de la supra kategorio.Fine ni povis profiti de la buso, ĉar ni multe insistis.Tio ne estas normala kaj ni ne komprenas tian situacion.
Tamen,feliĉe,ni vivis pozitivajn momentojn dum tiu kongreso dank'al la E-a lingvo.
Ni havis la eblecon renkonti kaj komuniki kun multaj personoj el diversaj naciecoj:ni estis 2115 kongresanoj kaj reprezentis 52 naciojn.Tio estas eksterordinara!

M.Candel.

# en français...



Nous avons reçu deux extraits de presse fort intéressants sur la "guerre des langues". Le premier nous a été adressé par André Rocher(2 Rue Méjane 12500 Espalion) et provient de "Science et Vie" de Septembre, "Forum des Lecteurs".Il s'agit d'une réponse à un lecteur qui vantait l'emploi de la langue anglaise et doutait de l'utilité du français pour communiquer avec l'étranger.

..." La prépondérance actuelle,insistons bien sur cet adjectif,de la langue anglaise est dûe à la suprématie économique américaine,et non à des vertus particulières de sa structure ou à la richesse de son vocabulaire.Une crise économique telle que celle de 1929 pourrait modifier bien des choses et, par exemple, restaurer aux places qu'elles occupaient alors la langue fran-çaise et la langue allemande. Le succès de l'anglais était alors dû à la position élevée de la Grande-Bretagne dans le domaine scientifique et tech-nique../. Quand Marie Curie découvrit le radium,à la fin du siècle dernier, l'illustre Rutherford lui écrivit en français pour lui demander des informa-tions. Cela reviendra peut-être...

Le deuxième extrait provient de "Midi Libre" du 21 Novembre :"Guerre des Images : Paris en Lice" (article de R.Dabernat).

..."Actuellement,dix-huit télévisions déversent leurs images sur l'Europe, dont une seule en français. En voici la liste :9 sont en anglais,3 en alle-mand,1 en russe,1 en italien,1 en français et 3 en "multilangues". Autrement dit,les cultures étrangères mais aussi les chansons,les variétés, les jeux télévisés en provenance notamment du monde anglo-saxon,risquent de prendre une place encore plus importante....D'ici 1990,on attend 16 nouveaux satellites de télévision au-dessus de l'Europe.Ils transmettront au total,150 programmes de télévision...La britannique BBC vend sur les marchés extérieurs pour 900 millions de francs d'émissions internationales. L'organisme parisien "France Media-International" vient très loin derrière avec seulement 30 millions de francs.."

******

*Merci à André Rocher de nous avoir communiqué ces articles. Un autre merci pour s'être proposé pour participer à l'organisation de la "caravane" en car au Congrès de Varsovie (voir article à ce sujet).*

******

**FRANCA ESPERANTO-INSTITUTO**
**INSTITUT FRANCAIS D'ESPÉRANTO**

JARO 1985/1986
FEDERACIO : LANGVEDOKO-RUSILJONO
SUKCESIS EN LA EKZAMENOJ.

Atesto pri Lernado:

- ANSON Ramos (SB)
- BASTIDE Gilbert(SB)
- DESTREZ Sylviane (B)
- FOURNIER Diane (B)
- HUBERSON Paul
- PORRE Roger (SB)
- SCHLUMPF Georges (B)
- SOULIER Sophie(B)

Atesto pri praktika lernado:


- BASTIDE Gilbert
- CAYZAC Claude (SB)
- SCHLUMPF Georges (SB)
- SOUMAH Aïssata (SB)

*Sincerajn gratulojn al la sukcesintoj. Espereble ili estos pli multaj venontjare, ĉefe en la pli altnivelaj ekzamenoj.*

*La Direktorino de la Ekzamencentro:*
*Jeannine Vincent.*

Komprenelle la Federacio aldonas siajn gratulojn al la sukcesintoj

******




KULTURA ESPERANTO-DOMO GRESILLON 49150 BAUGE.

Kulturaj aranĝoj 1987

Aprilo : 19/25 : Internacia Renkonto de Infanoj
Junio : 14/30 : Internacia renkonto (kursoj,distraĵoj)
Julio : 2/16 : Prelegoj kaj kursoj
16/22 : Altnivela Semajno
Aùgusto: 23/7-13/8 : Someraj kursoj
13/30 : Lernado, praktiko, turismo

*************************************************************************




**79ª FRANCA KONGRESO de ESPERANTO** ĉe la lazura marbordo en LA GAILLARDE apud FREJUS - ST-RAPHAEL de la 5ª ĝis la 9ª de Junio 1987, dum Pentekosto.

La nacia kongreso okazos en komforta kaj bele lokita restadejo. Eblos ferii tie antaŭ aŭ post la kongreso. Ankaŭ eblos tendumi en proksima kampadejo,kun ebleco mendi varmajn pladojn en la kuirejo aŭ aĉeti en magazeno mempreparotajn manĝaĵojn.Ĉiu ĉambro de la restadejo estas dulita,kun duŝejo,fridujeto kaj kafmaŝino.Pluraj ĉambroj estas speciale atingeblaj per rulseĝoj. La kongresontoj ankaŭ disponos pri tenisejo, naĝejo,pilkludejo,ne parolante pri la maro trans la strato aŭ promenadoj en la montoj... Kiel kutime okazos du belaj ekskursoj,unu vizitos la interkrutejojn de la rivero Verdon, alia estos ŝippromenado laŭlonge de la Ora Korniĉo.
<u>Informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉe:Esperanto Tour Vadon A 83700 St Raphaël.</u>
Atentu ! Post la 31a de Marto 87 ne plu estos eble garantii loĝadon en la kongresejo!

*******************************************************************************

**ŜPARU MONON ...** Aliĝu frue al la kongresoj,staĝoj,renkontoj,ktp...

<u>UFE-Kongreso</u>: Kotizoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| ĝis la 31/12/86: Kongresan(in)o : | 160F | Paro : 230 F | Junuloj,studentoj:100F |
| ĝis la 31/03/87: " | 190F | " 290 F | " " 115f |

| <u>UK de Varsovio</u>: | ĝis 31/12/86 | ĝis 14/05/87 | post 14/05/87 |
|---|---|---|---|
| Kategorio 1 | 572 F | 685 F | 800F |
| Kategorio 2 | 455 F | 572 F | 685F |
| Kategorio 3 | 343 F | 455 F | 572F |
| Kategorio 4 | 230 F | 343 F | 455F |

Kat.1: kongresano ne individua membro de UEA Kat.2:individua membro de UEA
Kat.3: Kunulo/junulo/Handikapulo,kiu ne estas individua membro de UEA
Kat.1: " " " kiu estas " " "
Gejunuloj,kiuj aliĝas al la Junulara Kongreso de Krakovo(18/25 VII)aliĝas senpage al la Kongreso de Varsovio (principe).

*******************************************************************************



*72-a UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO*
*25 Jul. — 1 Aŭg. 1987*
*VARSOVIO, POLLANDO*

El nia regiono,estas planataj tri karavanoj al Varsovio
1ᵘ) Por biciklantoj,el Perpignan en Februaro (vidu aparte)
2ᵘ) Por aŭtomobilistoj kun aŭ sen tendo,ruldomo. Foriro Meze de Julio,reveno la 10 an de Aŭgusto (Kontaktu J.H.)
3ᵘ) Per aŭtobuso el Montpellier,Nîmes,Avignon,Lyon,Dijon,ktp (kosto de la transporto inter 800 kaj 1200 F). La vojaĝ-agentejo okupiĝos pri la vizoj kaj pretas rezervi ĉambrojn en Varsovio.Ju pli frue,des pli bone! Respondecos pri tiu eventuala karavano : André Rocher/2 Rue Méjane 12500 Espalion.

*******

Pri tiuj du lastaj karavanoj petu de J.Hénin aŭ A.Rocher demandaron por komune decidi pri la vojiro kaj turisma programo.Ne forgesu afrankitan koverton!

*******

Le Congrès de Varsovie sera certainement le plus imposant à ce jour (6000 personnes attendues). Si vous désirez vous joindre à l'un des groupes qui partiront depuis notre région (l'un en voitures, l'autre en car), demandez un questionnaire à l'une des deux personnes mentionnées ci-dessus pour que le programme soit décidé en commun (joindre une enveloppe timbrée). Plus tôt nous prendrons les décisions,mieux nous serons servis!
Gis la revido en Varsovio !

*******

# Diversaĵoj

La Kataluna E°-Asocio kaj la Konservantaro de la Inter--ciaj Floraj Ludoj invitas la ĉiulingvajn esperantistajn poetojn kaj prozistojn konkurse konkuri per siaj plej valoraj verkoj en la tradicia beletra trobadora Festo de la 27aj Internaciaj Floraj Ludoj,kiu okazos en la kadro de la 23a Kataluna Kongreso de E° en la Jubilea Jaro 87a. (limdato por sendi la verkojn : la 31a de Majo 87)

## en la regiono...

A.F.C.E. (Association Française des Cheminots pour l'Esperanto) decidis elekti Perpignan kiel IFEF-kongresurbon. La kongreso okazos de la 4a ĝis la 11a de Junio 1988 en la Kongresa Palaco de Perpignan.

* * *

MONDHEJMO: Ekologia Centro Internacia kun E° kiel oficiala lingvo. Ĝi baldaŭ naskiĝos en la vilaĝo Cauduro,inter St Pons kaj St Chinian, do proksime de Béziers. Bonan sukceson al tiu projekto !

* * *

STAĜOJ

En la "Kvinpetalo" de Bouresse (departemento Vienne)

Aprilo 87 : 21/25 : Preparado de la skriba parto de Pedagogia At. Eblos trapasi "kapablecon" komence de la staĝo

Majo 1/3 : (en Poitiers) Sesa literatura forumo de L.F.koop

Julio10/15: staĝo de formado de recenzantoj

23/28: Jurnalisma grafiko:de la kompostado al la bindado

Aŭgusto : 30/7-4/8 :Historio de la E°-komunumo preparado al la parola parto de "Pedagogia Atesto"

6/11: Staĝo por la formado de radiofoniaj aktoroj

Septembro 11/16 : Stud-, ripoz- kaj turism-staĝo.

ALVOKO: Urbo Chambéry decidis,laŭ klopodoj de la E°-grupo,ke skvaro nomiĝos "Square Docteur Zamenhof". La oficiala nomigo okazos la 10an de Majo 1987. La E°-grupo petas,ke vi sendu gratulleterojn al la Urbkonsilio de Chambéry,pere de Raymond Boré 481,Rue du Bertillet 73000 Chambéry. La tuta E°-grupo de Chambéry simple kaj sincere antaŭdankas vin.

INTERESA RENKONTO estos la tria Printempa Semajno Internacia,de la 17a ĝis la 24a de Aprilo 87 en Rastatt (FRG),je 50 km norde de Strasburgo; precipe familia feriado ĝi kontentigos egalrajte plenkreskulojn kiel infanojn.Ankaŭ ne-esperantistaj familianoj estas bonvenaj.La programeroj dependos de la fantazio kaj bezono de la partoprenontoj :manlaboro,muzikumado,lum--bildoj,teatraĵetoj,internaciaj ludoj k. kutimoj, interesa turisma programo kaj kompreneble diversaj E°-kursoj

**KORAJN BONDEZIROJN AL VI KAJ LA SAMIDEANOJ EN VIA LANDO**

F Buckley

Nia simpatia angla amiko vizitis 13 landojn en la 2 lastaj jaroj kaj 300 E°-gru--pojn.Li invitas vin al la Brita Kongreso en Kimrujo(17-20IV87).



Limdato por la centa numero de SFS: la 29an de Marto 87

Feliĉan jubilean jaron